

Pola Esperantisto

XXXI
JARO

MARTO
1937

Esperantista
Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI GIS LA 20-a DE
CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LA O BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

DRO HENRYK DATNER

POLLANDO SUB LA SIGNO DE LA „VERDA STELO“

Kiel paradokso povas ŝajni, ke ĝuste la mondmilito kaŭzis la bezonon de alproksimiĝo inter la popoloj, sed la penso de la interfratiĝo nur tiam povos esti realigita, se la plej multenombraj homamasoj apartenantaj al diversaj nacioj, reciproke ekkonatiĝos. Kiel bloveto forflugus tiam la supozo, ke ekzistas *naciamalamo*. Ne malamo ĝi estas, sed nacia *histerio*, kiu instigata de senkonsciencaj politikistoj gvidas al kataklismoj. Ĉar ĉiu homo posedas memkonservan instinkton, povas tiaj kataklismoj devigi la homamasojn por defendi sin kaj mortigi siajn najbarojn.

Tio estas ankaŭ la kaŭzo, ke la ideoj kaj programoj, kiuj celas interfratiĝon de la homaro, nur al tiuj cirkonstancoj dankas sian disvolvon.

Grandan malhelpon ĉe alproksimiĝo de la popoloj prezentas la diverseco de la lingvoj, kiu malebligas la reciprokan interkomunikigon, ĉar la vorto parolata plenumas sian taskon nur tiam, kiam ĝi ĉ sempre influas, kaj plejparte ĉiam ĉe la necesaj tradukoj perdita estas la potenca impreso de la viva vorto. Tiu ideo inklinis ankaŭ la kreinton de Esperanto

kiam li decidis krei la gigantan verkon de helpa mondlingvo, ĉar Dro Zamenhof celis nur realigi la ideon de la komuna homarinterfratiĝo, kaj nur pere de universala lingvo li intencis realigi tiun revon de sia tuta vivo.

Por kompreni la valoron kaj meritojn de tiu genia verko, oni devas ekkoni bone la ideon kaj evoluan vojon de Esperanto, oni devas studi la psikologion de la diversaj popoloj, kaj la filologian signifon de la lingvo mem.

La mondmilito kaŭzis ankaŭ plifortigon de naciismo, kaj ĝuste tiu vekita nacia sento konvinkis ĉiujn pacamajn individuojn pli ol en la antaŭmilitaj jaroj pri la neceso de mondlingvo, ĉar ĉiu nacio emas atribui al propra lingvo pli grandan valoron ol al iu alinacia lingvo. La lingvo estas ja ĝuste la nacia *tr ezoro*, kiu donas ateston pri kulturo kaj vivebleco de la popolo. Ankaŭ tiu penso estis gvidstelo por la kreinto de Esperanto. Ne la forigon de la naciaj lingvoj li celis, nek la nacian senton li volis ofendi!

Nun sekvas la demando: Ĉu Esperanto plenumis sian taskon? La ideon de sia kreinto?

Pasis 50 jaroj de ĝia ekesto, 50 jaroj de pena, oferema laboro de ĉiuj adeptoj de nova ideo sub la signo de la kvinpinta *v e r d a s t e l o*, kaj dum tiu tempo ĝi pruvis bone sian viveblecon, ĉar en ĉiuj mondpartoj ĝi posedas milojn da samideanoj, kaj la skeptikeco, kun kiu la nova lingvo estis komence akceptita kaj la ironia rideto malaperas pli kaj pli kvankam ankoraŭ ne ĉesas la kontraŭuloj batali kontraŭ ĝi, proponante de tempo al tempo novajn saĝne pli taŭgajn helplingvojn. Sed felice pligrandiĝas preskaŭ ĉiutage la simpatia rondo de la *e s p e r a n t i s t a f a m i l i o*!

La esperantista komunumo uzas kiel plej gravan propagandilon ĉiujare en diversaj landoj aranĝitajn universalajn tutmondajn kongresojn de Esperanto!

Danke al tiuj kongresoj servas Esperanto multe al la kongreslandoj sur la vojo de la propagando; ĉar partoprenas la kongresojn ne nur esperantistoj, sed ankaŭ ekstera publiko kaj ne malofte ĝisunuaj kontraŭuloj, kiuj komence vidas en la kongreso nur simplan spektaklon, kaj poste, kortuŝitaj de vere familia harmonio inter diverslandaj gastoj, fariĝas fervoraj esperantistoj!

Al la Jubilea Kongreso de Esperanto invitis *V a r s o v i o*, la ĉefurbo de Polujo, kie vivis, studis, suferis kaj mortis la *k r e i n t o d e l a I d e o*, samideanojn el ĉiuj mondpartoj. Polujo vaste konata pro sia gastamo preparas sin por akcepto de esperantistoj kaj simpatiuloj de la esperanta movado kaj ĝi klopodas laŭ ĉiuj fortoj prezenti al la gastoj ne nur la grandkreskintan infanon de sia samlandano, kiun adoptis la

tuta mondo en ĝia plej bela vestaĵo, sed ankaŭ la naturbelajojn kaj aliajn vidindaĵojn de sia lando. Per la pola proverbeto „Gasto hejme — Dio hejme”, estos salutataj la simpatiaj pilgrimoj el la tuta lando, venantaj al *M e k k o d e E s p e r a n t u j o*!

Polujo, lando de eksterordinaraj naturbelajoj, estas ankoraŭ tro malmulte konata. Varsovio, Krakovo, Poznań, monumentoj de pasinta gloro kaj atestantoj de unu post longa mallibereco al nova vivo renaskiĝinta potenca nacio, Zakopane kaj Tatry, belega montaro, banlokoj ĉarme situataj, kiel Krynica, la maro kun havenurbo Gdynia, vera miraklo de la XX-a jarcento, donas al la mastroj de la kongreso la eblecon agrabligi la tempon en plej alta grado. Polujo utiligos ĉiujn eblecojn por solene honori la *t u t m o n d a n K o n g r e s o n*, starantan sub Alta Protekto de la Statprezidanto, prof. Ignacy Mościcki, kaj doni pruvon pri la kultura disvolviĝo de la lando antaŭ la reprezentantoj de tiom da popoloj.

La Jubilea Kongreso donos okazon pruvi al fremdlandanoj, ke Polujo meritasi vizitata de turistoj el la eŭropaj landoj, ke la tradicioj de la gastamo vivas en la nobela nacio, ke la Loka Kongresa Kamitato laŭ ĉiuj fortoj plifaciligos al la karaj gastoj la restadon, donante al ili samtempe la senton de hejmeco.

Esperantistoj, plenumu vian sanktan devon, pilgrimante okaze de 50-jara naskiĝtago de la mondlingvo al la Tombo de la nobla Gvidanto, kie Lia spirito estos kun vi Samideanoj, kunigitaj sub la *v e r d a s t a n d a r d o*!

KORAN BONVENON EN POLUJO!

„Esperanto en la Moderna Vivo”

La plej eminentaj personoj de Francujo, inter kiuj Statprezidanto Albert Lebrun, ĉefministro Léon Blum, Prezidanto Edouard Herriot kaj 15 Ministroj de la nuna franca Statestraro, tre afable akceptis patroni la Internacian Konferencon „Esperanto en la Moderna Vivo”.

Sed ne nur la personoj alvenas al ni, sed ankaŭ gravaj movadoj partoprenas la laborojn de la Preparaj Komisionoj de la Konferenco.

En la fako „Internacia Trafiko”, estas oficialaj reprezentantoj de la gravaj Foiroj de la Konfederacio de la Franca Metiistaro, kaj ĉefe, de la grava Federacia Unuiĝo de la Sindikatoj pri Iniciatoj (Turismaj Asocioj).

En la sekcio „Intelektaj Interŝanĝoj”, estas ankaŭ oficialaj reprezentantoj de la Konfederacio de la Intelektaj Laboristoj, kaj de multaj gravaj asocioj, kiuj okupiĝas pri interkompreniĝado, radio, kino-arto, ktp...

Jen ĝojgaj faktoj; sed jen ankoraŭ pli ĝojgaj:

Per letero de la 18-a de januaro, s-ro Jean Zay, ministro pri Publika Instruado, akceptis la proponon de la Unua Prepara Komisiono de la Konferenco, pri organizo de eksperimento pri enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Sub kontrolo de s-ro Rektoro Pariselle, ĵus komenciĝis en Besançon oficiala nedeviga kurso de Esperanto por la gelernantoj de la mezgradaj lernejoj, sub gvidado de s-roj George kaj Erdmann, profesoroj en la Supera Lernejo por instruistoj, de s-inoj Racine kaj Pochard, lernejestrinoj, kaj de f-ino Salmona, profesorino. La plej bonaj lernantoj de tiu kurso partoprenos la Konferencon; la konferencanoj faros al ili demandojn, kaj oni vidos la mirindajn rezultojn de trimonata Esperanto-lernado. S-ro Luc, Ĝenerala Direktoro de la Teknika Instruado de Francujo, ĵus decidis oferi du vojaĝ-premiojn al la Konferenco por la du plej bonaj lernantoj de tiuj kursoj.

Per letero de la 22-a de januaro, s-ro Dautry, Ĝenerala Direktoro de la Stataj Fervojoj, informis nin, ke la administracio, kiu jam faris informojn en Esperanto en la stacidomoj de Paris, tuj malfermos oficialan kurson de Esperanto, en la stacidomo Saint-Lazare, por la fervojistoj de la Stato. La profesoroj estos oficestroj de la administracio de la fervojoj, la kursejoj estos ankaŭ en la stacidomo.

Samtempe,* en la Esperantista Franca Centro, oni malfermis specialan kurson por artistoj. Dek-ses artistoj de la kompanio „Art et Travail” (Arto kaj Laboro), kiuj ĉiusemajne ludas per radio ĵen en Paris-PTT, ĵen en Radio-Paris, sekvas regule la kurson.

Fine ni sukcesis restarigi la Parlamentan Esperanto-Grupon, dank' al la klo-

podoj de s-ro Richard, vĉ-prezidanto de la antaŭa grupo, kaj de nia amiko s-ro Pierre Bloch, deputito de la departemento Aisne. S-ro Richard fariĝas la prezidanto de la nova grupo, S-roj Philip kaj Philippot la vĉ-prezidantoj, kaj s-ro Pierre Bloch, ĵuna kaj plej agema deputito, fariĝas le ĝenerala sekretario. Kunlaborante plej intime kun la SFPE, la nova grupo alportos al nia movado en Francujo altvaloran helpon.

Jen niaj unuaj laboroj, niaj unuaj sukcesoj por la Jubilea Jaro.

Ni havas altvaloran idealon, ni provos efektiviĝi ĝin.

Ni, esperantistoj, devas konsideri la modernan mondon, kiel nian mondon. Ni devas foriri el nia malgranda „kapeleto”, ni devas nin turni al la homamasoj de la diversaj landoj petante ilin, ke ili kunlaboru en nia porpaca laboro.

Ni ĉiuj scias ke la mondo, nuntempe, plej profunde transformiĝas. El la profundezaĵoj de la popoloj elvenas nova humanismo.

Se ni velas, ĉiuj kune, forlasante interdiskutojn pri tute malgravaj aferoj, ni povos doni al tiu nova humanismo la lingvon kiun ĝi bezonas, kiel la kleruloj donis al la mezepoka humanismo, la latinan lingvon.

Pripensu karaj legantoj, ke estas ankaŭ loko por vi en la Konferenco, kaj ke kiani, post kelkaj dekoj da jaroj, vi parolos pri la komenco de la vere sukcesa periodo de Esperanto, vi povos iom fiere diri: „Ĝi okazis dum la granda Ekspozicio en Paris... en 1937... kaj en ĝi mi kunlaboris!..

P. Pettit

Ĝenerala Sekretario de la Konferenco
„Esperanto en la Moderna Vivo”.

NI KLINAS NIAN KAPON

Multaj esperantistoj devis lasi sian vivon — dum la mondmilito, batalante en sialandaj armeoj. Mortis francaj esperantistoj por Franclando, mortis germanaj por Germanlando, bulgaraj por Bulgarlando, mortis anglaj kaj skotaj esperantistoj por la Brita Imperio...

Ili mortis ne pro tio ke ili estis esperantistoj, certe ne; sed pro tio ke ili defendis la patrujon.

Se la nuna informo estas vera, kiun oni ĵama aŭdis de diversaj flankoj kaj ĵam legis en diversaj komunikoj kaj gazetoj, nome: ke en Kordobo la anoj de la ĝenerala Franco ordonis fusiladon de ĉiuj esperantistoj, motivante sian ordonon per la deklaro ke esperantistoj kiel amantoj de paco kaj kiel adeptoj de internacia lingvo estas danĝeraj por la hispana popolo. — se tiu informo estas

vera, ke niaj samideanoj en Kordobo de-
vis lasi sian vivon ne pro sia eventuala
aparteneo al certa politika partio, do
ne pro sia politika konvinkigo sed pro
Esperanto mem, tiam nia movado nun
havas siajn unuajn s a n g martirojn.

Tiu informo ŝajnas al ni tiel nekred-
ebla ke ni ŝatas atendi ĝian konfirmon
per dokumentoj nepre pruvkapablaj, kun
datoj kaj detaloj. Sed tiajn oni povos
ricevi eble nur post finiĝo de tiu te-
rura fratbatalado.

Se tamen la dokumentoj pruvus ke niaj
Kordobaj samideanoj mortis nur pro la
fakto ke ili estis esperantistoj, tiam la
ago de l' Franco'anoj estus ne nur
„grandioza eruro” sed ĉielen-krianta krimo
kontraŭ kulturo kaj civilizacio, kom-
parebla nur al mezepokaj bruligoj de
homoj kiuj volis alporti al la homaro
novajn ekkonojn de scienco, novajn pro-
gresojn aŭ plialtigon spiritan kaj kultu-
ran.

Kun sama rajto aŭ malrajto oni povus
persekuti kaj fusiladi homojn pro tio ke
ili havas radio-aparaton aŭ estas posed-
antoj de aŭtomobilo, ke ili uzas steno-
grafion aŭ — ke ili lernas fremdan na-
cian lingvon.

Oni povus kompreni la furiozadon
kontraŭ Esperanto kaj esperantistoj, se
nia lingvo estus rezervita por unuflanka
uzado al unuflanka politika partio, al
difinita rasa aŭ religia tendenco. Sed
fakte ja Esperanto estas destinita por
ĉiuj: por blankuloj kaj nigruloj, por ma-
lajoj kaj mongoloj, por demokratoj, fu-
ŝistoj kaj komunistoj, por romkatolikoj
kaj budhanoj, por mahometanoj kaj lu-
teranoj, por sanktuloj kaj krimuloj.

JUBILEAJ „ESPERANTO-POŝTMARKOJ EN USONO?”

Ĝis nun neniu angle-parolanta lando
honoris la Esperanto-movadon per spe-
cialaj pri - Esperantaj poŝtmarkoj. Ek-
zistas la ebleco, ke Usono eldonos jubi-
leajn poŝtmarkojn okaze de la 50-jara
jubileo de Esperanta. Tio estus bonega
instigo por la poŝtadministracioj de mul-
taj aliaj landoj. Certe la ekzemplo es-
tus sekvata de tuta serio da landoj, kio
estus por la esperantistoj granda reko-
no pri la graveco de nia afero.

Grava oficisto de la usona poŝta ad-
ministracio klarigis, kiel tiu celo povus
esti atingata: „Devas alveni ĉe la Poŝt-
master General en Washington kelkaj

Kaj kion, diri, kiam en faŝista Italujo
la propaganda ministerio eldonas unu-
luktan broŝuron en Esperanto post alia,
kiam la italaj radiostacioj konstante dis-
sendas informojn en Esperanto, aranĝ-
ante eĉ konkursojn por alilandaj esper-
antistoj kun valoraj premioj, ĉion kun
la celo instigi esperantistojn-turistojn
(ĉu „daŭgerajn” por la itala popolo?) al
vizito de la belega itala lando! Kion di-
ri, kiam la brazila registaro (ja kontraŭ-
komunista!) ekstreme favoras la Esper-
anto-movadon, ĉiel subtenante Esperan-
to-kongreson, eldonante oficialajn poŝt-
kartojn kaj poŝtmarkojn kun Esperanto-
tekstoj! La itala kaj brazila registaroj —
kaj certe ankaŭ aliaj: la aŭstria, franca
ktp., la aŭstralia Senato, kaj multaj gra-
vaj korporacioj — komprenis la signifon
de unu tutmonda interkomprenilo apud
la gepatraj lingvoj. La aliaj, kiuj kon-
traŭbatalas, kiuj malhelpas la esperan-
tistojn: Portugalujo, Germanujo, kaj ŝaj-
ne do ankaŭ la Franco'anoj en Hispan-
ujo, simple ne komprenas ĝian signi-
fon. Ankorau ne. Sed certe ankaŭ la nun
nekomprentantoj iam devos ekkompreni
ĝin. Al tio devigos ilin la faktoj mem
de la venko de nia afero en la cetera
mondo. Alvenigi tiun venkon ju pli frue
des pli benigne por ĉiuj popoloj de la
Tero, — jen la konstanta sankta tasko
de l' pioniroj de nia movado.

Ni klinas nian kapon antaŭ la spiritoj
de ĉiu, niaj mortintaj samideanoj, kaj
solene premasas daŭrigi ilian laboron ĝis
plenumiĝo de la multmiljara revo.

T. J.

(El „Heroldo de Esperanto”)

centoj aŭ miloj da leteroj kun la po-
stulo, ke oni eldonu, aŭ kun la dezir-
esprimado ke, aperu, aŭ kun la demando
ĉu aperos jubileaj poŝtmarkoj okaze de
la 50-jara Esperanto-Jubileo. Se amaso
da tiaj leteroj venos el tuta Usono, kaj
el multaj landoj de la mondo, oni v-
idos, ke temas pri grava publika deziro...
kaj la ŝancoj, ke la poŝta administra-
cio eldonos jubileajn poŝtmarkojn, estos
tre bonaj...”

Do estas en la manoj de la tutmonda
samideanaro por instigi aŭ preskaŭ-devi-
gi la usonan poŝtan administracion el-
doni specialajn poŝtmarkojn. Preskaŭ

ĉiunonate Usono eldonas iujn novajn jubileajn poŝtmarkojn pri plej diversaj aferoj kaj historiaj datrevenoj. De ĉiu eldono la filatelistoj aĉetas por kelkaj centmiloj da dolaroj. Oni devas montri, ke la filatelistoj havos grandan aĉetintereson ankaŭ pri Esperantaj poŝtmarkoj.

La usona samideanaro faris planojn por sistema laboro — por montri al la usona poŝtadministracio, ke vere ekzistas grandega intereso en la tuta mondo por Esperantaj jubileaj poŝtmarkoj el Usono.

Jen la laborplano:

El ĉiu urbo de Usono venos centoj da leteroj al la Postmaster General en Washington kun petoj, instigoj kaj demandoj. Ĉiu samideano instigos ĉiujn siajn amikojn skribi mallongan leteron. Kaj kion povas fari la samideanoj en la cetera mondo?

En ĉiu urbo de la mondo, kie estas Esperanto-kluboj, kelkaj samideanoj skribu mem leterojn aŭ al la Postmaster General aŭ al la Third Assistant Postmaster General (Tria Helpa Generala Poŝtdirektoro) kun diversaj petoj. Ĉiu unuopa samideano devus instigi siajn amikojn, kaj speciale tiujn, kiuj estas filatelistoj. Per relative malmulta elspozo de unuopaj samideanoj ekzistas la ebleco de kolosaj rezultoj.

La leteroj (esperant-lingvaj kiuj estos tradukataj de samideanoj en la poŝtadministracio) povas enhavi plej diversajn kialojn: ekzemple ke okaze de la jubilea jaro de la Esperanto-movado oni deziras ricevi jubileajn poŝtmarkojn

el ĉiuj landoj kiuj eldonas tiajn: ke la brazila, rusa, aŭstria, kaj aliaj landoj jam eldonis kaj aliaj eldonos Esperantajn poŝtmarkojn, aŭ oficialajn poŝtmarkojn kun Esperanta teksto, kaj se Usono ankaŭ eldonus, certe centmiloj da esperantistoj volus akiri ilin. (En 1937 ĉiuj gosamideanoj povos ja esti filatelistoj, almenaŭ por kolekti la diversajn jubileajn markojn). Oni povas uzi diversajn kialojn kaj klarigojn (sed oni nepre ne diru ke estus granda helpo por la Esperanto-movado, se Usono eldonus tiajn markojn).

Ĉefa afero estas, ke dum la venontaj kelkaj semajnoj kaj monatoj tiaj leteroj alvenu regule, kaj ne ĉiuj samtempe. Ne devas sekvi, poste, monatoj de silentado. Do en kluboj ne ĉiuj samideanoj skribu samtempe. Kelkaj skribu dum la unua monato, aliaj en la venontaj semajnoj, estus bone, se iu membro aŭ speciala komitato zorgus pri iom da sistemo en la prizorgo de tiu ĉi afero.

La rezultoj povas esti grandaj. Se Usono eldonos tiajn poŝtmarkojn, la samideanoj en multegaj landoj povos pli facile atingi la saman sukceson en sia propra lando. Do via kunlaboro ne helpos nur al la Esperanto-movado en Usono, sed al la tutmonda Esperanto-movado. Ĉie la samideanoj povus montri ke grava, granda, angle-parolanta lando eldonis Esperantajn poŝtmarkojn. Nia sukceso estos via sukceso. Kiu volas kunlabori?

Joseph R. Scherer.

DANGERA TAKTIKO

Antaŭ kelkaj semajnoj aperis en „Ilustrowany Kuryer Codzienny“, la plej disvastigita ĉiutaga gazeto en Polujo — korespondajo el Wien, kies aŭtoro komunika, ke en la estraro de U. E. A. en Genevo „la unuan violonon ludas komunistoj“, kaj ke ĝuste ili malhelpis la transdonon de UEA-biblioteko al Esperanto-Muzeo en Wien.

Tondrosimila estis la impreso de tin sciigo, kin kaŭzis konsternon kaj maltrankvilon en la sferoj de polaj esperantistoj. Neeble estis al la estraro de PED malkaŝi la fonton de la citita komunikajo, kies enhavo estas evidente malvera.

Hazardo helpis al la Redakcio de P. E. se ne ĝisfunde malkaŝi, do almenaŭ kon-

jekti la rondojn, kiuj inspiris la fatalan korespondajon en I. K. C. Jen ni legas en la n-ro 2/3. 1937. de „Bulteno“ de Aŭstria Esperantista Federacio artikolon s. t. „Politikaj intrigoj en U. E. A.“, kiun ni permesas al ni ĉi sube represigi!

„Lastatempe cirkulis tra la aŭstria gazetaro artikoleto pri UEA, ke en ĝi regas komunistaj intrigoj kaj ke nur kulpde komunistaj komitatanoj de UEA, la biblioteko de ĝi ne estis donita al la E-muzeo de Wien kiel siatempe decidis la malnova komitato. Ĉar fine de la artikoleto estas menciata ke la E-muzeo en Wien jam nun enhavas la plej grandan E-bibliotekon de l' mondo, oni facile povas diveni, de kiu „flanko“ la respektiva noto estis inspirita.

Ĝis nun oni nur sciis, ke la svislanda tribunalo laŭ la statuto de UEA malpermesis la fortransporton de la UEA-biblioteko el Genevo. Ke komunistoj sidas en la UEA-komitato, estas lo tute nova, ĉar la „flanko” de kiu eliris supozeble la citita komuniko pri UEA, eĉ mem sidis antaŭ kelkaj monatoj en la sama komitato inter tiuj „komunistoj”, sed neniam raportis pri komunistaj intrigoj, sed tiam energie substrekis la neŭtralecon de UEA.

Ni ne povas prijuĝi ĉu la aludo pri UEA estas fakte vera, AEF ankaŭ ne estas advokato de UEA por ĝin defendi, sed ni devas mencii tion pro alia gravaj konkludo rilate al Esperanto. Nome la ĝenerala politika situacio en la mondo

ne estas tia, ke oni povu en la gazetar-nacia publikigi raportojn, ke en la movado laŭdire estas komunistaj tendencoj sen endangerigi Esperanton kaj ĝian movadon mem, ĉar en kelkaj ŝtatoj oni eble inklinas la E-movadon (kiel internacian movadon) rilatigi kun komunismo kaj tiamaniere havigi al si la pretekston por ĝia malpermeso. (Ekzemplon jam liveris Germanio kaj Portugalio). Ke ankaŭ Esperanto (kiel ĉiu alia nacia lingvo) estas uzata por politikaj celoj, estas afero tute diferenca.

Tial ni devas rekomendi al la estraro de la nova I. E. L. ke ĝi tiusence ankaŭ instruu la prezidantojn de la landaj asocioj aliĝintaj al IEL.”

TUJ PAGU VIAN PARTON
POR RICEVI LA KONGRESKARTON.

POR AKIRI „STELON DE MERITO”
AL VARSOVIO VENU SEN HEZITO.

Pola Literatur-akademio pri E. Orzeszko

Ni prezentas ĉi tie antaŭparolon de Pola Literatur-Akademio al I-a volumo de Eliza Orzeszko, kiuj komencos aperi en la nuna monato.

Eliza Orzeszko apartenas al verkistoj, kies kreado ligas sin senpere kun la vivo, kaj fontoj de inspiraj fontanas meze de la ĉirkaŭanta realaĵo. Sed la artista prezentado de tiu realaĵo, ĝia zorgema kaj plej fidela envortigo ne elĉerpas signifon de la verkoj de Orzeszko, ne konsistigas ŝian tutan verkistan meriton. Eliza Orzeszko kreative ĉiam deziregis la vivon influi, ŝi penis ĝin laŭ modelo de siaj kredoj transformi, laŭ mezuro de siaj amataĵoj suprenlevi kaj perfektigi.

Tiu interna morala ordo, kiun ŝi obeis dum la tuta vivo, difinis la plej noblan linion de ŝia biografio kaj al ŝia verko ĝi havigis altan tonon prefere de misieco, ol de artoplena majstreco.

Ŝi kontraŭstaris al persvadoj de la vivo kaj voko de la gloro, ŝi ne foriris de la lokoj, kies superbela ĉarmo plenis ŝinjn verkojn per beleco de neforgesebla pejzaĝo. Ŝi persistis ĝisfine tie, kie resti ordonis al ŝi profunda devosenŝo, kiun ŝi neniam evitis.

Malfacila estis tiu posteno destinita al ŝi de la sorto en la plej malfacila periodo de la nacia vivado, en kompli-

kita interplektujo de problemoj naciaj, religiaj, kaj sociaj.

En la mallumo de la politika premano, sufokanta en limteritorioj pli forte ol en aliaj regionoj de Pollando, Eliza Orzeszko per siaj verkoj plifortigadis la nacian konscion, vekadis socian justecsenton, je internaj disiroj ŝi trovadis medikamenton en toleremo kaj frateco.

En ŝiaj romanoj rolas homaj valoroj de ĉiuj socitavoloj, bezonoj kaj zorgoj de ĉiuj tavoloj loĝantaj tiujn terojn. Plendoplenaj historioj de homoj negravaj kaj mallaŭtaj ne havis por ŝi sekretojn. En iliajn aferojn, en iliajn maljustaĵojn kaj dramojn ŝi sciis eniĝi profunde kaj ne nur doni al ili esprimon, sed ankaŭ prezenti elirejojn kaj rimedojn de savo.

Ĉiu el ŝiaj verkoj estas signifoplena socia faro. Enprofundigante en vivon de la sociaj „malaltaĵoj”, pulsante per problemoj, kunligitaj kun vivo de la vilaĝa popolo, tiuj verkoj ricevas hodiaŭ novan aktualecon. Vastaj aroj de la legantoj, ne posedantaj ĝis nun aliron al multaj ŝiaj verkoj de longe elĉerpitaj, trovas en tiu eldonaĵo leguĵon de alta artista valoro kaj de profunda nobla enhavo.

Kvindekjara Jubileo de la Romano „Apud la Rivero Niemen“

Kvindek jaroj pasas de la momento, kiam „La Ilustrita Semajngazeto“ alportis sur siaj kolonoj unuajn ĉapitrojn de la apudniemena epopeo.

Sian romanon Orzeszko komencis skribi frusomere en la j. 1886 en bela vilaĝa landangulo, en Miniewiczze, situanta proksime apud la prezentata en la verko et-nobela vilaĝo Bohatyrowicze. En novembro la unua volumo estis jam preta, do la aŭtorino sendis ĝin al Varsovio al recenzo. La akcepto, kiun ĝi spertis, superis la plej kuragaĵajn atendojn. La redakcio de „La Ilustrita Semajngazeto“ respondis per peto pri la permeso de tuja ekpresigo de tiu romano. Nenion helpis la klarigoj de Orzeszko, ke la verko estas malproksima de la fino, ke ŝi ne povas garantiĝi la pluan parton, ke ŝi neniam presigis verkon apenaŭ ĝisduone skribitan — „La Ilustrita Semajngazeto“ en nova jaro alportis komencan de la romano „Apud la rivero Niemen“. Orzeszko instigata per leteroj de la redaktoroj, tutajn tagojn pasigadis apud skribotablo plue ŝpianante sian rakonton. Ŝi finis ĝin nur en somero 1887 en la sama Miniewiczze, kie ŝi komencis ĝin verki.

La socio akceptis tiun romanon entuziasme. Sufiĉu diri, ke ŝia gloro malheligis la sukceson de trilogio de Sienkiewicz. La aŭtorino akceptadis de ĉiuj partoj de Pollando kaj de eksterlando dekojn da leteroj kun dankoj, vortoj de raviteco kaj kortuŝo. Unu el kunlaborantoj de la Semajngazeto, poeto kaj literaturisto devenanta el Litovujo, Vincenty Korotyński, skribas al ŝi: „La romano „Apud la rivero Niemen“ estas por mi verko, kin nur revata estis, sed ne ekzistis en nia literaturo. Cetere ne nur mi sola tiel opinias: la plej severa kritikisto, Jozefo Kenig, delonge ne plu leganta romanojn, enprofundiĝis en legado de la romano kaj ne povas sufiĉe prilauĝi ĝian artistan belecon. Feliciano Suryń, vidante komunecon inter la kompatemo de la romanverkistino kaj de poeto Kondratowicz koncerne al vidado de viv-cirkonstancoj de la et-nobela kaj simpla vilaĝoj dediĉis al la Estiminda Sinjorino sian studaĵon pri la poeto „de fratoj en kapoto kaj kitelo“. Tiel do estas propraokula atestanto de

vereco en mi, atestanto de **artismo** en Kenig kaj de la plej grava **celado** en Suryńa“. Kaj Ludoviko Jenike, longjara redaktoro de la Semajngazeto, la sama, kin antaŭ dudek jaroj akceptis por presigi la unuan rakonton de Orzeszko, post tralego de „Apud la rivero Niemen“ konfesas al la aŭtorino: „En nia konvinko mi parolas ĉi tie pri mi, pri mia edzino kaj pri kelkaj proksimaj personoj ĝi estas ĉefverko, povanta esti komparata nur al unu „Sinjoro Tadeo“, ĉar mal-kovranta tute novajn, ne konatajn al ĉiuj horizontojn. Kaj kiom da poezio trovigas en ĝi, krom aliaj ankoraŭ pli gravaj bonaj ecoj, pri kiuj ni espereble jam buŝe parolos. Dankojn al vi, Sinjorino, pro tiu varma sento, dankojn en nomo de miloj...“

Tiuj „gravaj ecoj“, pri kiuj ne povis en la letero skribi Jenike estis kontraŭbanditaj en la verko antaŭ la okuloj de la rusa cenzuro patriotaj sentoj, tiuj lerte kovritaj vortoj de apoteozo de la januara insurekcio, kin ĝuste instigis Polojn kaj fortigadis. Tre klare skribas pri tio Orzeszko en unu letero al sia tradukantino je la germana lingvo: „La tuta romano elŝpiniĝis el la fora kaj prikaŝita nodo, kin estas la insurekcio en Litovujo en 1863 j. La sorto, karakteroj, suferoj de familio de Korezyński kaj Bohatyrowicz, amo de Johano kaj Justino, preskaŭ ĉio, kio fariĝas en la romano, estas alkrōĉita al tiu nodo kaj de ĝi prenas sian komencan aŭ kaŭzojn de disvolvulo. Tiu nodo, pro cenzuraj kaŭzoj, estas prikaŝita de vualo de prisilentoj kaj metaforoj kiu facile frapas la okulon de la pola leganto. Mankas ĉia dato, kaj nenia aĵo concernanta la naciajn batalojn kaj suferojn estas laŭnome cilita. Ĝi estas, oni povus diri, stilo mallibereja: tiun vorton signifas tiom da frapoj alian — tiom da ili, tia signo estas por tiu ideo, tia — por alia. Kaj ni interkomprenas — la aŭtorino kun la legantoj — bonege...“

Tion komprenis la invadintoj: la duan eldonon de la romano oni severe cenzuris, sed kiam ankaŭ tiu rapide ekmanĝis, la tria estis konfiskata. Kaj — post kelkaj jaroj — rekoninte, ke tiu verko ne plu estas danĝera, ili permesis novan represon, sed kondiĉe, ke ĝi estos

farita el la eldono cenzurita. Tiu varian-
to — preparita de la invadintoj — ĝis-
daŭris la hodiaŭon. Nur nun la entre-
prenita unua kritika eldono de la
verkaro de Orzeszko, rehavigos sendube
al tiu ĉefverko ĝian aŭtentikan tekston.

MEDITADO...

Malvarma, malseka, antaŭprintempa
vespero. Pluvetas. Laciĝis de tultaga la-
boro la korpo, laca estas la animo, mal-
bonhumora. Mi ekfunkciigas la radio-
ricevilon. Jazz-muziko. Nel Turno de la
butono — parolado. Raŭka, tondra vo-
ĉo, pli ĝuste — kriego... Foren! Ha, „nia
kara“! Jes! Kaj oni admonas amase partopreni la „Oran Kongreson“, viziti Varso-
vion, la lulilon de Esperanto kaj ĉi-
okaze honori la cindrojn de la Mjistro.
Tio estis Hilversum, Nederlando. Mi jam
kaptis nur la finon de la parolado, be-
daŭrinde. Vera surprizo, mi meditis: Ne-
derland, kaj oni jam faras propagand-
don por la Kongreso, dum niaj radio-
stacioj obstine silentas...

Ĉu oni timas malkvietigi la Ripozan-
ton en la „lulilo“?... Helpas nek dank-
, nek pelleteroj.

Mi malkuplas la aparaton, kaj prenas
en la manon la februaran numeron de

HENRYK GIELB

Zelazowa Wola la lulilo de Chopin

(okaze de la III. Intern. Konkurso je nomo de Chopin en Varsovio.)

Dimanĉe la 21. II. k. j., en plena sa-
lono de la varsovia Filharmonio en ĉe-
esto de la pola Ŝtatprezidanto, Prof. Mo-
ścicki, okazis la inaŭguro de la III. In-
tern. Konkurso je nomo de Chopin, kiu
daŭris ĝis la 14. de marto.

La unua tia Konkurso okazis en la
jaro 1927; ĝin partoprenis 16 polaj kaj
10 eksterlandaj pianistoj. La dua kon-
kurso okazis en la jaro 1932; tiun partoprenis jam 70 muzikistoj, inter kiuj
47 eksterlandaj.

La nuna III. Konkurso arigis pli ol
100 partoprenintojn el 22 landoj jene:
Polujo 27, Hungarujo 10, Francujo kaj
Italujo po 9, Aŭstrio kaj Germanujo po
6, Sovetio 4, Belgujo kaj Rumanujo po 3,
Estonio, Finnlando, Grekujo, Holandujo,
Japanujo kaj Latvio po 2 kaj Anglujo,
Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo,
Palestino, Svisujo kaj Svedujo po 1.

Tiu aranĝo havis do plene internacian
karakteron.

Orzeszko, kiu tiel bele kaj noble alparo-
las per noveldonitaj de la Societo de ŝia
nomo „Leteroj“, fariĝos fine, en kvindek
jaro de la apero de tiu ĉefverko, ekko-
ebla al la socio en siaj bonegaj verkoj
en teksto vera, originala.

P. E. Interesa titolo: „Esperanto en Ger-
manujo“. Mi legas: „Laŭ postuloj de la
polico la Esp.-organizajoj en Germanu-
jo devis ĉesigi la laboron... Komercista
Esp.-Unio (Keu) ankaŭ estis devigita li-
kvidiĝi. „Keu“ protestis, sendis kopiojn
de laŭdaj kaj aprobaĵaj leteroj de mini-
sterioj kaj... la polico tute komprenis
la gravecon de nia laboro kaj permesis
la daŭrigon de la laboro...“ Konklude?
Jen: „se ni — asertas la direktanto R. —
se ni povos montri al la ekonomia mi-
nisterio peradon de multegaj mendoj —
oni ŝatos nin...“.

Kaj mi meditatdis... kiel bone estus,
se nia tutmonda samideanaro vaste mal-
fermus siajn poŝojn por multegaj men-
doj por ke la polico ŝatu la „Keu“-on
kaj krome por akceli la konstruadon de
multegaj... kanonoj!...

N. R.

Ĉi okaze mi volas noti kelkajn liniojn
pri la naskiĝloko de tiu genia pola mu-
zikisto, kiu famiĝis tra la tuta mondo,
fariĝinte unu el la plej konataj kompo-
nistoj internaciaj.

La „Mazurki“ kaj „Polonezy“ de Chopin estas eksterlande konataj ne malpli multe ol en Polujo. Dum interparoloj kun eksterlandanoj, apud la nomoj de la plej famaj Poloj, neniam mankis la nomo de la genia Chopin, pri kiu miaj interparolintoj esprimiĝis kun pietismo, ĉiam aldonante: fieri povas Polujo!...

Tiel ĝuste estas; ni fieras kiam la su-
surado de pola saliko, en formo de ra-
viga muziko de Chopin, sorĉas kaj ra-
vas la korojn de niaj amikoj sur la
tuta terĝlobo. Tial estis por ĉiu kompren-
ebla afero, komprenita kiel sankta de-
vo, kiam grupo da homoj, inter ili ko-
nata generalo E. Sosnkowski, Inspekto-
ro de la Pola Armeo ekhavis ideon for-
aĉeti kaj rekonstrui Zelazowa Wola, la

tiom karan por ĉiu Polo nacian memoraĵon, la naskiĝlokon de Chopin.

Ĝi estis simpla dometo, vilaĝa kabano, kie ekvidis la mondon la senmorta Chopin. Dika musko-tavolo kovris la kabanon, kiu ĉiam pli kaj pli komencis kliniĝi teren...

Ĉirkaŭ la kabano etendiĝis kelkcentmetra areo da ĝardeno, ie ajn kovrita de kaŝtano, betulo aŭ saliko, sur kiuj, dum lunĝnoktoj, sin spegul-rigardante en la plaŭdanta rivero Utrata, sorĉe kantis najtingaloj...

La loĝantoj de la najbara Sohaĉev, trairante apud tiu dometo, pie malkovradis siajn kapojn, kaj la religiemaj eĉ faris krucosignojn. Sed Poloj el aliaj regionoj, ĉu povis ili scii, ke ĝuste en tiu malzorgita kabano naskiĝis la genia verkinto de la „Mazurki”...

Tri jaroj da oferema laboro, kun helpa aprobo de la tuta pola popolo, kreis en Żelazowa Wola medion, kie ŝajnas, ke ĉiu arbo, ĉiu floreto, ke preskaŭ ĉiu ŝtono vivas kaj spiras per la genio de la Granda Majstro...

Kun plezuro do mi akceptis la afablan inviton de sro Kapitano Jan Jawicz, partopreni viziton al Żelazowa Wola.

Kiam la limuzino portis nin 100 km/hore sur la glata ŝoseo al Sohaĉev, venis en mian memoron vortoj de la fama pola pianisto Ignacy Paderewski pri Chopin. „kiu sur la fundo de la pola animo trovis karajn juvelojn, kaj faris el ili la plej multekostajn valoraĵojn de nia nacia trezoro. Chopin estis tiu, kiu enkondukis la polan kampulon en la vastan mondon, en brilajn kastelojn kaj salonojn. Li egaligis kaj starigis unu apud la alian, baronon kaj paŝtiston, grafinon kaj vilaĝan orfineton.”

VIVO DE ZAMENHOF EN TEATRO

La teatro Ŝin-Cukiĝi (Tokio), kiu estas tre fama pro kuraĝa entrepreno de novaj teatraĵoj, nun intencas prezenti sur scenejo la vivon de Zamenhof.

En nuna momento la japana juna generacio soife atendas kuraĝigan arton. En pasinta jaro la teatro Ŝin-Cukiĝi prezentis la dramon de Gorkij „Sur fundo de mizero” kaj rikollis grandan sukceson. En nova repertuaro por tiu ĉi jaro ĝi volas havi vivojn de herooj de tut-homa kulturo, ekz. Darwin, Pasteur, Hideo Noguei k. t. p. Konsiderante la ju-

Li — poeto-sorĉisto, ĉiopova animreganto, egaligis ĉiujn. — ne sur la tero, ne sur la nivelo de la ĉiutaga vivo, nur supre, alte, sur la plej altaj supraĵoj de la homa sento...

Krepuskiĝis, kiam ni forlasis Sohaĉev, surveturinte larĝan aleon, envolvitan ambaŭflanke de maljunaj, larĝe sidantaj tilioj.

De malproksime mi rimarkis blankan domon, konservitan en simpla provinca stilo. Ĉirkaŭ tiu dometo etendiĝas bela parko, plena de diversa floraro. Leviĝas laŭboj kaj balustradoj. Belega teraso kondukas al la bordo de l' rivero Utrata, kiu per melodiasusuro ĉirkaŭas specialistan laŭbon, destinitan por vesperaj kanthoroj de la venontaj ekskursoj al Żelazowa Wola.

Laŭ la bordo de l' Utrata, tra artiste konstruita balustrado, ni suriras terason, leviĝantan anfiteatre apud argente brila lago. Tie oni konstruis grandan estradon; oni konstruis ĝin el simpla pola ŝtono, kiu tamen pli forte ol la plej karaj marmoroj impresas la ĉeestanton.

Sur tiu estrado okazos grandaj festivaloj Chopin'aj, altirontaj al la lulilo de la plej granda pola geniulo muzika. arojn da samnacionoj el la tuta lando kaj sennombrajn adorantojn de Chopin, el ĉiuj mondpartoj.

Vidante la grandegan laboron en Żelazowa Wola, kie el ruinaĵoj estis konstruita sanktejo, — sanktejo de nacia muziko pola — mi povis taksu kiom da energio devis elspezi tiu aro da homoj, kies celo estis rekonstrui la lulilon de Chopin kaj fondi tie pilgrimejon por la sennombraj amantoj de lia dia muziko...

bileon de Esperanto kaj homaranajn aspirojn de la publiko, la Teatro sentas devon dramigi kaj prezenti sur la scenejo la vivon de Zamenhof. En tiu teatra trupo sin trovas fervora kaj malnova samideano sro Takamura Sasaki. Li estas konata aktoro kaj samtempe dramverkisto.

Anoj de la Sciencista Plum-Klubo (grupo de agemaj sciencaj verkistoj) subtenas tiun ĉi planon de la teatro, kaj promesas fervore helpi ĝin. (El la februara numero de „Esperanto-Nippon”, Tokio).

EL LA AŬSTRALIA LITERATURO.

„Lawson, la unua klare distingbla voĉo de la vera Aŭstralio” — David McKee Wright.

„Bonaj Eŭropaj taksistoj de la literaturaj valoroj ne bezis

kompari Lawson, en la kampo de la novelverkado, kun Bret Herte, Gorki kaj De Maupassant” — Profesoro Emile Sallens.

La Alarmhorloĝo de Arvie Aspinall

De Henry Lawson (1867--1922).

Lastatempe aperis en iu gazeto notaĵo informanta ke policano, je la kvara matene, trovis malgrandan knabon dormantan sur la ŝtupoj de la fabrikejo de fratoj Grinder. Li vekis lin kaj demandis klarigon.

La hubeto diris, ke li tie laboradas kaj sentis timon esti malfruiginta; li devis komenci je la sesa kaj ŝajne estis tre mirigita, sciiginte ke ĵus batis nur la kvara. La policano ekzamenis pakajeton kiun la timplena infano tenis en la mano. Ĝi enhavis puran antaŭtukon kaj tri siropopanojn.

La malgrandulo plue klarigis, ke li vekigis en sia lito, sed, ĉar lia patrino devis longe lavi tolaĵon en la hieraŭa tago, li ne volis eldormigi ŝin por peti la hor-kiomon. Li ne rigardis al horloĝo, ĉar ili ne posedis tian. Li ne entreprenis pluklarigi kiel li rajtis atendi, ke la patrino povu diri la horon, sed, verŝajne, samkiel multe da aliaj geknabetoj, li havis senfinan fidon al la nemezurebleco de patrina scio. Lia nomo estis Arvie Aspinall (li informis, kun tima respekto) kaj li loĝis en strateto Jones. Patro ne vivas.

Post kelkaj tagoj la sama ĵurnalo tre plezuris plu informi, en rilato kun la „kortuŝa incidento” raportita de ĝi antaŭ iom da tagoj, ke sinjorino de bonfara societo jam iniciatis monkoklekton inter siaj amikoj, kun celo aĉeti alarmhorloĝon por la knabeto, kiun la policano trovis dormanta apud la fabrikeja pordo de fratoj Grinder.

Ankoraŭ post ioma tempo la ĵurnalo menciis ke, en rilato kun la „kortuŝa incidento”, iu aĉetis alarmhorloĝon kaj liveris ĝin al la patrino, kiu ŝajne estis komplete superfortita de l' dankemo. Sed de alia flanko oni sciigis, ke la lasta aserto estis multe troita.

La „kortuŝa incidento” fine forfrotigis per uzo en ankoraŭ unu notaĵo, kiu plene lasis certa tion, ke la homama

sinjorino estis neviu alia ol la ĉarma kaj talenta filino de la domo Grinder.

Estis malfrue en la lasta Paska liber-tempo, dum kiu Arvie Aspinall devis resti en la lito pro forta malvarmumo. Li ankoraŭ stalis, laŭ propra vorto, „krupe”. Jen ĉirkaŭ la naŭa matene la ĉiutaga aferumado en la strateto Jones jam plene zumbraadis.

„Pli bone, panjo, mi jam multe pli bone min sentas”, diris Arvie, „la sukero kaj la vinagro forigas la mukaĵon, kaj la ĝena tusado trovas pli facilan eliron”. Ĝi tiel facile eliradis, ke por la sekvan-taj kelkminutoj li ne povis paroli. Regajunte la spiron, li diris: „Pli bone aŭ pli malbone, mi tamen devos iri laboron morgaŭ. Donu al mi la horloĝon, panjo”.

„Vi nepre ne iros: vi irus al via mortolito!”

„Senutile tiel paroli. Ni ne povas malsatmorti — kaj — iu alia povus okupi mian laborlokon. Donu la horloĝon, patrino!”

„Mi sendos unu el la aliaj infanoj al la fabrikejo por peti promalsanan forpermeson al vi. Ili pro simpla kompato ne rifuzos al vi unu — du tagojn”.

„Senutile; ili ne atendus mian revenon. Mi bone scias — kion signifas al fratoj Grinder mia malsano? Ne grave, patrino, mi superos ilin ĉiujn, malgraŭ ĉio. Donu al mi la horloĝon, patrino.”

Ŝi donis; li streĉis ĝin kaj fiksdifinis la alarmon. „Io misfariĝis pri la martelito”, li subvoĉis: „jam du noktoj ĝi misfunkciis, sed ĉi-nokte mi riskos lasi. Mi fiksos la alarmon por ke la horloĝo batu je la kvina; tio donos al mi tempon por vestiĝi kaj fratingi la laborojon. Ho, se mi ne havus tiom longan vojon al ĝi!”

Li paŭzis, legante vortojn sur la cifertplato:

Frue en lito, kaj frue el ĝi,
Igas la homojn benitaĵ de Di
(daŭrigota)

EL POSTMORTA PARERUJO DE HELENA HEMPEL.

Sankta Luĉio

(marista napola kanteto).

Sur la mar' brilas
Stel' el arĝento,
Dolĉe favoras
Ondoj kaj vento
Dancas la barko
Kiel folio —

Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!

Bone ni fartas
En la barketo,
Pro la dolĉega
Kara venteto,
Ven: do, — preta
Nun estas ĉio —

Benu nin Dio, benu nin Dio!

Maro, venteto,
Ambaŭ ridetas,
Kaj la maristo
Zorgojn forjetas,
Gaj: kaj ĝoja,
Jen lia krio:

Sankta Luĉio, Sankta Luĉio!

Dolĉa Napolo,
Tera amata,
Pro la rideto
Dia benata —
Vi reglando
De harmonio!

Benu nin Dio, benu nin Dio!

* * *

KUNIĜO INTERNACIA KONTRAŬ MILITO KAJ MILITARISMO

Ne ekzistas pli nobla tasko ol krei en la mondo fratan pacan reĝimon. En homaro minacata denove de la krima milita frenezajo, ne estas pli urĝa tasko. Kurage kaj ne laciĝante, necesas rememorigi al la popoloj, la kondiĉojn de la vera paco.

Hodiaŭ pli ol iam, gravas ke bonvolemaj homoj, povantaj vidi nur rapidan alpaŝon al neevitebla milito en la nuna paca reĝimo starigita aŭ plifirmigita pretekste de pacdefendo, kunigu siajn penojn en komuna agado por bari la malfeliĉegon.

La kondiĉo de la paco neniam estos milito ĉe nomita liberiga aŭ revolucia. La kondiĉo de la paco estas la interpopola justeco, la rezigno al la milito dum la nuna tempo.

Por proklami tiun idealon kaj serĉi la rimedojn, por konvinki pri ĝi la homojn, la **Kuniĝo Internacia kontraŭ Milito kaj Militarismo** estas starigita. Tiu Kuniĝo celos kunordigi la klopodojn de ĉiuj pacifistaj asocioj kaj individuoj de la mondo. La agadon kiun ĉiu el ni faras en sia propra medio, ni devas konduki samtempe, nin apogante unuj sur la aliaj por starigi komunan baregon kontraŭ ĉiuj militeblecoj.

Jam iuj bone konataj famuloj certigis la Kuniĝon pri sia subteno; inter ili: la respektindaj J. Buskes, H. K. Gandhi, R. Tagore, Aldous Huxley, Bertrand Russell, J. Giono, G. Pioch, A. Melissa Graves, H. Roland Holst, Ellen Hörup, Lily Heber, kaj aliaj.

La Kuniĝo Internacia kontraŭ Milito kaj Militarismo okazigos sian unuan tutmondan kongreson de la 1-a ĝis 5-a de Augusto 1937 (Paris). Ĝi servas la porpacan batalon.

La Kongreso ne celos la absolutan neperforton. Ĝi kontraŭstaras ĉiujn militojn ĉu inter nacioj, ĉu inter rasoj. Koncerne enlandan militon malsamaj opinioj estas eblaj. Tamen, ĉiuj diversaj tendencoj rajtos klare esprimiĝi pri la metodoj uzotaj en la batalo por socia justeco.

La tasko estas grandega sed ĝi meritas esti entreprenata. Nur kuna agado de ĉiuj povos sukcesi. Pri tio, ĉiu estas respondeca.

La Internacia Komitato de la K. I. M. M. estas prezidata de F. CHALLAYE, sidas en Parizo (Francujo), 30 rue Joubert, 9^e.

LA KVAR SEZONOJ

Radlo Roma komunikas:

Karaj samideanoj!

Mi scias ke vi atendas ion novan de la Itala Ministerio, ĉu ne?

Efektive mi jam pretigis ion por vi, kion, do? Kion vi ricevos hejme de la Romo Esperanto-Fako?

Ĉu mi devas diskonigi la ĝojigan informon? Mi asertas, antaŭ ĉio, ke ni esperantistoj povas fieri pro la progresanta, disvastiganta laboro kiu fariĝas serioza, ĉiam pli utila, sendube grava, ĉar ĝi eniĝis en la praktikan kampon. Sed oni devas danki plenkore la Direkcion, kiu malavare disponigas tiom da mono por nia lingvo.

Estu certaj ke viaj multnombre alvenintaj leteroj, ĝentilaj, prezentantaj afablajn, kelkfoje kortuŝajn dankesprimojn, bondezirantaj al sukceso de nia kaŭzo, entuziasme petantaj kaj kuraĝigantaj por entrepreno de novaj laboroj, decidigis la Estraron presigi novan broŝuron en Esperanto.

Ĝi estas hela, tiom hela kaj luksa kiom ĉiuj eldonaĵoj de E. N. I. T.

La aŭskultantoj de Italaj Kronikoj povas peti ĝin, jam de nun, sed miaj plej fidelaj amikoj (kiujn mi ankoraŭfoje publike dankas) kiel ankaŭ la grupestroj, instruistoj, ligestroj, kursgvidantoj, fervoruloj, delegitoj de universalaj asocioj aŭ de naciaj federacioj, la nelacigeblaj propagandistoj, informu min pri la bezonota kvanto da ekzempleroj.

Kiom da ekzempleroj mi devas presigi? Jen la respondo, kiun mi atendas, kiu certigos min pri via diligenta sindona helpemo, kaj per tiu ĉi signifoplena statistiko mi konstatos la akcepton kiun vi preparas al la porturisma simpatia verko: La kvar sezonoj!

* * *

Interesuloj skribu tuj al: Ministerio Stampa e propaganda, Cronache Italiane del turismo (Esperanto-Fako), via Vittorio Veneto, **Roma**.

ĈIU ESPERANTISTO KUN BONA GUSTO VENOS AL VARSOVIO DUM AŬGUSTO.

DEMONSTRACIE MARSOS NI TRA BELAJ STRATOJ DE VARSOVI.

ALVOKO!

Samideanoj!

Tre gravan signifon havas la nuna jaro 1937 por nia Esperanto-movado: pasis 50 jaroj de la apero de Esperanto, kaj 20 jaroj de la morto de la kreinto Dro Zamenhof. Por ni japanoj ĝi estas pli grava jaro, ĉar ni havos en tiu ĉi aŭtuno 25-an jubileon Japanan Kongreson de Esperanto en Tokio kaj faros demonstracion al la publiko por prepari la vojon al praktika uzo de Esperanto en la Internacia Olimpiado, kiu havos lokon en Tokio en 1940.

Por festi ĉi nun signifplenan jaron kaj vekti la publikan opinionon por Esperanto, ni, membroj de Osaka Esperanto-Societo kaj de Filio de Japano Esperanto-Instituto en Osaka, intencas okazigi en la venonta aprilo grandan ekspozicion de Esperanto en la centro de nia urbego kaj se ĝi sukcesos bone, plurfoje por sekvontaj jaroj. Kaj ni turnas nin al vi kun jena peto pri kolekto de materialoj por la ekspozicio.

Ni ĝentile petas vin, ke vi havu la samideanan helpemon kolekti kaj sendi al ni la materialojn por nia ekspozicio laŭ la kolono A en la listo montrata sur aparta folio. Al viaj klopodoj fariĝitaj ni dankos vin per saŭspecaj japanaj materialoj (laŭ la kolono B), kiujn, ni kredas, vi povos utiligi plej efike por la propagando de Esperanto en via lando. (Ni sendos japanajojn post ricevo de viaj sendaĵoj). Se vi havas ian specialan deziron pri la materialoj de ni rekomence sendotaj, skribu al ni pri tio samtempe kun la ekspedo de la materialoj de via flanko. Ni klopodos kontentigi vin laŭeble.

Esperante ke via kunlaboro faciligos nian klopodon por la epokfaronta uzo de Esperanto en la Olimpaj Ludoj kaj ke via lando estos inde reprezentata en nia ekspozicio apud aliaj.

salutas vin sincere viaj
Osaka Esperanto-Societo,
Higasi-umeda 28, Kitaku
Oosaka, Japonujo

LISTO

de interŝanĝotaj materialoj por ekspozicio

* A *

* B *

- Ni deziras ricevi de vi jenajn:
- 1) Memlernolibro de Esperanto en via nacia lingvo (plej multe aĉetata kaj plej bona verko de konata aŭtoro), Skribu eldonnombron. 1 ekz.
 - 2) Esp.-nacilingva vortaro (same al supra rimarko) 1 ekz.
 - 3) Ŝlosilo de Esperanto en via nacilingvo 3 ekz.
 - 4) Esp.-gazeto de via Landa Asocio (du malsamaj numeroj laŭeble plej impone aspektantaj) 2 ekz.
 - 5) Propagandobroŝuroj por Esp. en via lingvo
 - por ne tre ampleksaj 3 ekz.
 - por ampleksaj broŝuroj po 1 ekz.
 - 6) Katalogo de viaj eldonaĵoj 2 ekz.
 - 7) Afiŝoj de Foiroj kaj Kongresoj en Esperanto po 1 ekz.
 - 8) Gvidlibroj pri via lando, aŭ urboj, aŭ prospektoj en E. po 3 ekz.
- 9) Jurnalaj kun Esp.-rubriko po 1 ekz.
 - 10) Poŝtomarko aŭ poŝtokartoj kun Esperanto teksto po 1 ekz.
 - 11) Listo de Esp.-organizoj en via lando, entreprenoj, fakaj societoj, (adreso, estraro, efektiva funkciulo, gazeto, kotizo ktp.)

La sekvantaj estas ne en Esperanto sed en via nacia lingvo:
 - 12) Du plej gravaj nacilingvaj tagjurnalaj en via lando po 2 ekz. (enskribu permane klarigojn pri ĉiu paĝo) (aldonu proksimuman nombron de legantoj t. e. eldonnombron).
 - 13) Gazeto aŭ periodaĵo plej vaste legata de inteligentuloj (sama rimarko kiel supre) 1 ekz.
 - 14) Ilustritaj gazetoj 2 ekz.
 - 15) Laŭeble belaj afiŝoj pri via lando aŭ komercaĵoj po 1 ekz.

Speciale al vi ni petas:
 - 16) Kursolibro de Esperanto po 1 ekz.
- Ni sendos al vi:
- K. Oosaka: Esperanto, kompleta kurso por japanoj. 145 p. po 1 ekz.
 - J. Okamoto, LK: Nova Vortaro E.-Japana. 228 p. 1 ekz.
 - Japana ŝlosilo 3 ekz.
 - „Esp.-Lernanto” 2 ekz.
 - Konturo de Esp. 3 ekz.
 - Parolado de s-ro Nagata, eksministro 3 ekz.
 - Kiel lerni Esp. 3 ekz.
 - Katalogo de JEI 2 ekz.
 - Ni ne havas tiajn kaj ne povas reciproki.
 - Japanujo 19 p. 3 ekz.
 - Oosaka (se ni sukcesos eldoni ĝin ĝustatempe) 3 ekz.
 - Listo de japanaj, (tre detala kaj utila) kitaj de Japanoj 1 ekz.
 - Ni ne povas reciproki.
 - Ni ne povas reciproki, ĉar ni ne havas tian.
 - Listo de japanaj, (tre detala kaj utila) ni mem faros.
 - Oosaka Asahi kaj Tokyo Nitiniti (aŭ Tokyo Asahi kaj Oosaka Mainiti) po 2 ekz.
 - ĉiuj kun 2,000.000 legantoj
 - Kaizo (Reformo), Tuo - Koron (Centrala Opinio), aŭ Nippon Hyoron (Japano Revuo) 1 ekz.
 - Asahi Graph 2 ekz.
 - Afiŝoj pri turismaj lokoj kaj komercaĵoj po 1 ekz.
 - Kidosaki: Kursolibro 1 ekz.

HUMORAĴOJ.

(Tradukis ing. M. Chmieliński).

Maltrompa ekkonilo.

— „Laŭ kio vi konk ludas, ke s-ro Johano intencas edziĝi kun vi?”

— „Ĉar li ĉiam asertas, ke en malpli multekostaj vestaĵoj mi plaĉas al li pli, ol en la multekostaj.

Si ne povis.

— „Kial vi ne kriis, dum tiu viraĉo kisis vin?”

— „Kion do, ĉu mi estas ventroparolantino?”

RADIO

La dua esperanta vespero sub la nomo „LJUBLJANA VESPERO” okazos jaŭde la 15-an de Aprilo je la 22.15 horo en la radio-Ljubljana (569.3 m 5 kw.) kaj daŭros proksimume unu horon.

La programo estas jena:

1). Ljubljana, koro de Slovenio. Prelegos Kozlevčar Joze.

2). R. Murnik: Mataja Matio unuan fojon en Ljubljana. (Sereca rekonto) Prelegos s-ano Krembergar Franc.

3). Interesaj de Ljubljana. Dialogo prezentata de ljubljano kaj fremdulo. Kunlaboros s-anoj Mizeril Deziderij kaj Kozlevčar Joze.

4). Ljubljananaj popolkantoj. Kantos anoj de Esperanta klubo.

Skribu nepre dankesprimojn al la radio-stacio de Ljubljana.



Katalogon petu de la admin. de „Pola Esp”.

POLLANDA KRONIKO

KRAKÓW. — La 25. de februaro k. j. okazis en la salono de Malnova Teatro solena koncert-vespero de fama estona ĥoro el Tartu „Tartu Meeslaulu Selts” sub direkto de la komponisto Eduardo Tubin. Inter la membroj de la ĥoro estis tri esperantistoj, kiujn salutis s-ano Schnützer. Niaj estonaj amikoj rakontis, ke en Estonujo organiziĝas multenombra karavano, kiu venos Pollandon po partopreni en la Jubilea Kongreso en Varsovio.

— Sekve de prelego, kiun havis s-ro ing. E. Tor en la Hejmo de Metiista Junularo organiziĝis tie kurso de nia lingvo, kiun gvidas s-ano Ryszard Rauczynski. La kurson partoprenas 25 junuloj.

— La 17. k. m. prelegis en la ejo de la Societo „Esperanto” s-ano H. Schnützer pri „Estonujo, lando kaj homoj”. La prelego estis tre interesa, des pli, ke la preleginto ĉerpis siajn informojn pri geografio, etnografio, kulturo, folkloro,

k. t. p. de Estonio ne el libroj, sed el viva fonto, nome de la loĝantoj mem, kun kiuj li kontaktiĝis dum sia vojaĝo tra ilia bela lando.

LWÓW. — Nia Societo „Esperanto” festos la 10. de aprilo k. j. en sia ejo (Instytut Muzyczny, ul. Kościuszki 6.) 30-jaran jubileon de esp. agado de la prezidanto Dro I. Fels. Ĉiuj malnovaj esperantistoj en tuta Polujo scias, kiom dankas nia movado en Lwów al la senlaca laboro de la Jubileulo. Li verdigis la karmemorán Dron Mikołajski (kiu prezidis la VIII. Univ. Kongreson en Kra-

ków) kaj per sia kunlaboro efike subtenadis la medicinan gazeton „Voĉo de kuracistoj”, kies eldonanto kaj redaktoro estis Dro Mikołajski. En la postmilita aperinta „Medicina Revuo” troviĝas multaj fakaj artikoloj, verkitaj de nia Junileulo.

(Rim. de la Redakelo. Ni elkore ĝojas pro la jubileo de Dro Fels, al kiu ni deziras antaŭ ĉio sanon, por ke li ĝisvivu 50-jaran jubileon de sia esperantisteco. Ĉiuj niaj legantoj estas kore petataj sendi por la 10. de aprilo laŭ adreso de la Lvova Societo, ul. Kościuszki 6, Instytut Muzyczny salutleterojn, kiujn oni laŭtlegos dum la festo).

— S-ro Szymon Szpund, redaktoro de tre disvastigita ĵurnalo „Chwila” promesis lerni Esperanton kaj enkonduki por-esp. propagandajn artikolojn en „Chwila”.

TORUŬ. — Fondiĝis filio de Pola Esperanto-Asocio. La estraron eniris: S-roj Marian Grodzki, prezidanto, Tadeusz Radomski, sekretario kaj ingeniero Michał Chmieliński, kasisto. Konsisto de revizia komisiono estas: s-roj Ignacy Dziedzic kaj Stanisław Zarski. Estas komencita kurso gvidata de ing. Chmieliński. Montriĝis granda intereso por la Jubileo, kaj oni decidis sendi petskribon al LKK., ke Toruń estu vizitata de postkongresa ekskurso, veturonta al Gdynia kaj Hel. Oni petas subtenon de nia propono ĉe L. K. K., menciante, ke Toruń, naskurbo de Kopernik, estas tutsomere vizitata de diversaj ekskursoj.

Adreso de la filio estas: M. Grodzki, Toruń, Chelmińska 5.

WILNO. — La Turista Esp. Rondo ĉe Z. T. K. aranĝis en pasinta decembro Zamenhofan Vesperon en la ĉjo de Hebra Kuracista Asocio. En la bele ornamita salono kunvenis ĉirkaŭ 200 personoj.

La vesperon inaŭguris s-ano Sik, memorigante interalie la grandan perdon, kiun spertis la tutmonda esperantistaro pro la morto de John Merchant kaj Robert Kreuz. Krome li dediĉis kelkajn varmajn parolojn al la pasintjaraj jubileuloj Baghy, Kalocsay, Ĥapiro, A. Cseh, kaj nia estiminda prof. O. Bujwid.

Dum la malfaldo de verda standardo s-ano Subotnik deklamis la „Preĝon sub la verda standardo”.

Sekvis prelegoj de Dro Goldbart s. t. „Esperanto kaj Kulturo” kaj de Dro

Gurviĉ pri Esp. literaturo. La unua preleginto akcentis la malfavoran tempon por la progreso de nia movado, la alia konstatis, ke nia literaturo tamen progresas, kvankam la esperantistaro ne estas tre legema.

Dro Perlmat, en sia parolado honoris la noblan personecon de nia Majstro.

S-ano Sik komunikis pri la lastaj novaĵoj koncerne la preparajn laborojn de LKK en Varsovio kaj alvokis ĉiujn al kunhelpe por certigi brilan sukceson al la Jubilea Kongreso. Per komuna kantado de la „Tagiĝo” finigis la oficiala parto de la Festvespero.

La dua parton de la programo realiĝis s-anoj Bregman, Lipowski, Kac, Alperoviĉ, Subotnik kaj Dro Goldbart. Fine bele ludis blinda violonisto Piernik.

La vilna gazetaro detale raportis pri la Vespero.

NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

DANUJO. — En januaro k. j. fondiĝis sur insulo Selando 8 novajn E-kluĵoj. — Sur la insuloj Lolland-Falster oni faras grandskalan propagandon por E. Kursoj estos starigataj ĉiuloke. — En Sudjullando le sveda E-instruisto s-ano Gillis Staberg kaj lia edzino gvidas kursojn en 6 diversaj urbetoj. — S-ano P.H. Holm nun gvidas kurson en la urbo Vejen. En oktobro li komencis kun 20 gelnantoj kaj jam nun unu el liaj gelnantoj, la fervora kaj lerta s-anino fino instruistino Sigrun Winther, Skodborghus, gvidas kurson por 16 infanoj en la tiea lernejo.

FRANCUJO. — La Foiro de Lyon, kiu regule uzas Esperanton por sia propagando kaj korespondado, eldonis novan kvinkoloran afiŝon kaj aliajn reklam-presaĵojn pri la foiro, kiu okazis en la tagoj 4-14 de marto 1937. La statistiko de la foir-oficejo montras forte kreskantan uzadon de Esperanto en la korespondado de la foiro.

— S-ro Albert Lebrun, prezidanto de la Franca Respubliko akceptis la Altan Patronadon de la Internacia Konferenco „Esperanto en la Moderna Vivo”, kiu okazos dum la nunjara Universala Ekspozicio en Parizo. 16 ministroj kaj vicministroj de la nuna franca registaro eniris la Honoran Komitaton de la Konferenco.

HUNGARUJO. — En kunsido okazinta la 4. de februaro k. j. la parlamentano, s-ro Jozefo Petajnek el Budapeŝto fariĝis prezidanto de la Hungara Katolika Landa Esp.-Societo. Li deziras interrilati kun atilandaj esperantistoj-parlamentanoj. Pro la Katolika Esperanto-Kongreso, invitota por 1938 al Budapeŝto, komenciĝis multaj Esperanto-kursoj en katolikaj rondoĵoj. En katolikaj gazetoj aperis multaj artikoloj, sciigoj de Hes kaj de skoltoj aperis en kelkaj ĵurnaloj. Kelkfoje oni laŭlegis skoltajn Esperantajn sciigojn en ĵurnalara programo de radio-stacio.

JUGOSLAVUJO. — Esperanto estis ĉiam konsiderata en Zagreb kiel utopia entrepreno. Granda malintereso regis inter la intelektuloj pri niaj internacia lingvo kaj celo, al kiu iras obstine esperantistoj el la tuta mondo. Malkomprenemo estis renkontata en ĉiu angulo, primokado en ĉiuj rondoĵoj kaj tavoloj, unuvorte: esperantistoj estis siaj solaj adeptoj. Tiu ĉi stato tendencis daŭri longan tempon. Sed en la lasta momento venis ega renverso favora al Esperanto. Danke al la scienca klarigo pri la evoluo de internacia lingvo kaj ties utiloj por la tuta homaro, nun estas preskaŭ netrovebla prudenta homo, kiu estus kontraŭa al Esperanto. La kroatlingva broŝuro „Internacia lingvo en la historio

kaj hodiaŭ" de D-ro Ivo Lapenna multon faris en tiu senco, same kiel liaj prelegoj pere de la radiostacio Zagreb. Liaj artikoloj en Zagrebaj ĵurnaloj kaj du intervjuoj en tagĵurnalo „Novosti" yekis kaj turnis ĉies atenton al niaj celo kaj idealo. — Krom lia penado disvastigi bonan opinion kaj komprenemon por Esperanto, ankaŭ multon faris „Laborista Esperanta Societo en Zagreb" kaj „Akademia Esperanta Societo en Zagreb" per diversaj aranĝoj, ekz. per du libro-ekspozicioj aranĝitaj pasintaŭtuno en du Zagrebaj librovendejoj. Menciinda estas ankaŭ la agado de la Esperanta klubo en Zupreŝiĉ, kiu disĵetis 5000 flugfoliojn inter la tieajn kamparanojn, varbante ilin por lerni Esperanton.

NEDERLANDO. — La ĝenerala direktoro de la nederlanda Poŝto, Telegrafo kaj Telefono, s-ro ing. H. M. Damme, en radio-parolado pri la praktika valoro de Esperanto por la internaciaj poŝt-, telegraf- kaj telefon-rilatoj, esprimis la opinion, ke plej bona solvo por eliri el la lingva haoso estus, se ĉiuj homoj krom sia gepatra lingvo povus uzi ĝeneralan helplingvon. Li diris, ke la (nederlanda) gvidantaro de la PTT-servo akcelas la lernadon de Esperanto ĉe la PTT-oficistoj, ke la PTT-administracio disponigis ŝildetojn „Oni parolas Esperanton" por pendigi ĉe la ĝiĉetoj, kaj ke ĝi permesis al la oficistoj dum la deĵoro porti la verdan stelon, la ekkonilon de l'esperantistoj.

SOVETIO. — La „Leningrada Asocio por Instrua kaj Scienca Kinematografio" fondis Esperanto-sekcion por aranĝi tutmondan enketon pri la uzado de la kinematografio en la alllernejoj. Detalaj informoj kaj la enketa demandaro estas riceveblaj ĉe adreso: Poŝtkesto 532, Leningrad 3, Sovetunio.

SVISUJO. — Svisa Turisma Centralo en Zŭrich publikigis ilustritan broŝuron

en la mondhelplingvo Esperanto, sub la titolo „Svislando en la neĝo", pri la diversaj vintroportoj, kun praktikaj klarigoj kaj kun tabeloj pri vintroportlokoj, hoteloj ktp.

TENDARO POR JUNULOJ ĈE LA ORIENTA MARBORDO.

Oni proponas aranĝi por esperantistaj knaboj kaj junuloj (14 - ĝis 19-jaraj) tendaron apud Ipswich, Suffolk, ĉe la orienta marbordo de Anglujo; dum la lastaj dek-kvin tagoj de aŭgusto, ĉiu Esperantista junulo — ĉu komencanto aŭ spertulo — estos bona. Oni precipe bonvenigos alilandajn junulojn. La kosto por 15 tagoj estos proksimume 30 ŝilingoj, kiu enkalkulas la koston de manĝaĵoj kaj dormloko en tendo, sed ne veturkoston.

Interesatoj bonvolu sendi nomojn kaj adresojn al la Sekretario, B. E. A. 142 High Holborn, London, W. C. 1, kiu dissendos defalojn kiam la definitivaj aranĝoj estos faritaj.

Plenaĝuloj, kiuj deziras iel helpi, bonvolu skribi al la Sekretario.

ALVOKO AL KUNLABORADO.

La Redakcio petas insiste:

a) literaturremajn legantojn pri kunlaborado per regula alsendado de originalaj kaj tradukitaj literaturajoj,

b) propagandistojn pri verkado de artikolej koncernantaj la problemojn de esperantista movado,

c) estrarojn de societoj apertenantaj al P. E. D. pri regula sendado de raportoj kaj koncizaj notoj pri la agado de siaj grupoj. La enhavo de la komunikajoj estu vere esenca. Oni evitu troadon, panegiraĵojn, personajn reklamojn k. s.

Se vi deziras, ke „Pola Esperantisto" estu interesa legaĵo por ĉiuj kaj inde reprezentu la landon de la Jubilea Kongreso, provizu ĝin per leginda materialo

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 80.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 80.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

29. -- KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDACIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 84.